

Thomas malfermis la EMAS-kulturtagon en Bremen

Auf den Spuren der Kelten und Alemannen, Aalen; **10.-17.4. PSI Frühlingswoche für Familien, Kinder, Jugendliche, Erwachsene, St. Andreasberg;** 17.-20.4. Brit. Esp.-Kongr., Salisbury, GB; 17.-19.4. Studienwochenende, Herzberg; 18.-26.4. Esp.-Tage, Bydgoszcz, PL; 25.4. Tag der Offenen Tür bei UEA, Rotterdam, NL; 1.-10.5. Esp.-Festival auf der Krim, Jalta, UA; 7.-11.5. Franz. Esp.-Kongr., Troyes, FR; 9.-10. 5. Esp.-Tag Baden-Württemberg, Stuttgart; **20.-24.5. BARO, Bad Münder;** 22.-24. 5. Schwed. Esp.-Kongr., Borlänge, SV; 22.-25.5. Esp.-Kongr. USA, St. Louis, US; 23.-29.5. Eisenbahner-Kongr., Trieste, IT; **28.5.-2.6. GEK Deutscher und Europäischer Esperanto-Kongress in Herzberg;** 5.-7.6. Schott. Esp.-Kongr., Dundee, GB; 9.-17.6. Esp.-Frühling an der Ostsee, Mielno, PL; 10.-14.6. Blue fluas la genciano, Jugendwochenende, Goldegg, AT; 19.-21.6. Mexikan. Esp.-Kongr., MX; 25.6.-1.7. FREŜO, Olsztyn, PL; 26.6.-11.7. Sprachenfestival, Maribor, SV; 29.6.-5.7. Roskilde Rockfestival, Roskilde, DK; 29.6.-17.7. Sommeruniversität, San Diego, US; 2.-5.7. Spanisch. Esp.-Kongr., Málaga, ES; 4.-9.7. Arto-ŝoko Leben und Werk von van Gogh, Touquet, FR; 5.-18.7. Sommer-Zeltlager, Lančov, CZ; 7.-12.7. KEF Kultur-Festival in Helsingør, DK; 8.-12.7. Baltische Esp.-Tage, Paikuse, Estland; 10.-16.7. Esp.-Kongr., Rumonge, Burundi; 10.-18.7. Sommer-Studienwoche, Modra, SK; 12.-17.7. Brasil. Esp.-Kongr., Juiz de Fora, BR; 16.-18.7. KVAK Jugendtreffen, Wien, AT; 17.-25.7. ILEI Konferenz der Esp.-Lehrer, Krakau, PL; 18.-25.7. IJK Intern. Jugendweltkongress, Liberec, CZ; 18.-25.7. IEK Intern. Esp.-Kongr., Bydgoszcz, PL; 18.-25.7. SAT-Kongr., Mailand, IT; 18.-25.7. Ökumen. Esp.-Kongr., Wrocław/Breslau, PL; 18.-24.7. Esp.-Konferenz: Humorvolle Literatur, Kondoros, HU; 19.7.-1.8. Sommer-Zeltlager, Lančov, CZ; **25.7.-1.8. UK Esp.-Weltkongress, Białystok, PL;** 1.-8.8. Kulturtourismuswoche, Herzberg; 1.-5.8. Nachkongress, Gdańsk/Danzig, PL; 1.-5.8. Nachkongress, Malbork, PL; 1.-15.8. SOMERE Sommertreffen, Kall-Krekel; 2.-8.8. MIRO Jugendtreffen, Čakovec, KR; 2.-15.8. Sommer-Zeltlager, Lančov, CZ; 8.-16.8. 32a SEFT Sommer-Familien-Ferien-Zeltlager, Thomsdorf; 15.-22.8. Kurse, Plouezec, FR; 22.-29.8. EKOTUR Ökotour für Radfahrer und Wanderer, Svitavy, CZ; 22.-29.8. Int. Esp.-Woche zwischen Meer und Seen in Südfrankreich, Sète, FR; 27.8.-3.9. Italien. Esp.-Kongr., Cassino, IT; 4.-6.9. Bulgar. Esp.-Kongr., Vraca, BG; 25.-27.9. Kultur an der Mosel, Zell/Mosel; 26.9. Treffen im Wörlitzer Park, Dessau; 1.-4.10. KoKoLoRES Spieletreffen, Herne; 3.-4.10. Sammlertreffen, Herzberg; 9.-11.10. Konferenz der tsch. Esp.-Gesellsch., Svitavy, CZ; 9.-12.10. TORPEDO Pädagog. Seminar + Studienwochenende, Herzberg; 10.-12.10. Japan. Esp.-Kongr., Kōfu, JP; 12.-18.10. InPaSem Sprechwochenende, Dobřichovice, CZ; 5.-9.11. Esp.-Woche mit Wanderungen und Kursen, Herzberg; 11.-13.12. Studienwochenende, Herzberg; 27.12.-3.1. JES Jugendtreffen, Zakopane, PL; 27.12.-3.1. IF Inter. Festwoche, Nördlingen; 27.12.-3.1. NR Neujahrstreffen;



Alejandro Cossavella el Argentino bele koncertis en Bremen



Amuza vespero kun bonega etoso dum la antaŭ-kristnaska vespero en la „Pfanne-kuchen“

# RATKAPTISTA KURIERO

## INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 43 JANUARO 2009

Kontakt: Heinz W. Sprick hameln@esperanto.de www.esperanto.de/hameln Tel:0162/7536396

## Termine 2009 (1. Halbjahr)

dienstags **19.00 Uhr,** Sumpfblume, Hameln

**20.Jan., 17.Feb., 17.Mrz.,** *10.-17.4. PSI Frühlingswoche in St. Andreasberg;*
**21.Apr., 19.Mai, 20.-24.Mai BARO in Bad Münder;** *28.5.-3.6. Deutscher + Europäischer Esperanto-Kongress, Herzberg;* **16.Jun., Sommerpause,** *25.7.-1.8. UK Esp.-Weltkongress, Białystok, Polen;* **18.Aug.;**
*Das aktuelle Programm: **www.esperanto.de/hameln***

**Einladung zur Jahreshauptversammlung:**
am: **17.März 2009** um: **19 Uhr** in der **Sumpfblume** in Hameln
Tagesordnungspunkte: Begrüßung, Jahresbericht, Kassenbericht, Bericht der Kassenprüfer, Entlastung und Neuwahl des Vorstands, Wahl eines Kassenprüfers, Anträge, Planungen 2009, Verschiedenes

Esperanto-Kurs für Anfänger: dienstags 18-19 Uhr, Sumpfblume, HM

Esperanto-AG am Schiller-Gymnasium montags 13.50-15.20 Uhr, 1x/Monat samstags 9.30-1200 Uhr (10.1., 21.2., 14.3., 18.4., 9.5., 13.6. ???)



**„Wer sind die Brasilianer?“**

**Vortrag von Dominique Viera aus Brasilien mit Beamer-Präsentation am Dienstag, dem 20. Januar 2009, 19 Uhr, Sumpfblume.**

Am 19. Januar besucht er bereits die Esperanto-AG am Schiller-Gymnasium. Informationen zur Rundreise finden sich auf der Seite http://turneoj.wikispaces.com/Vieira+2009 und im Blog von Dominique Viera auf der Seite http://dominiquevieira.wordpress.com .



**Mallonga raporto pri aktivecoj en 2008:**



Ralitsa ĝuis la kunestadon kun kelkaj Esperantistoj en Londono.

La jaro 2008 komenciĝis per tre malĝoja evento. Ni partoprenis la funebran ceremonion por nia mortinta klubanino Eleonore Jüngel. Ŝi longe restos en nia memoro. Krom tio en 2008 ni renkontiĝis 21-foje: 15-foje en la „Sumpfblume“, 2-foje en Bad Münder dum la BARO kaj po 1-foje en la “Pfannekuchen”, dum la vizito de la Esperanto-Grupo en Hanovro, dum la somera festo ĉe Heinz kaj okaze de la Rata Rendevuo. En junio Heinz, Ralitsa kaj Robert el Hanovro helpis ĉe la Esperanto-projekto dum la projekttagoj en la Schiller-gimnazio en Hameln kaj la lernantoj verkis tre diligente afiŝojn kaj entuziasme prezentis Esperanton al la kunlernantoj, gepatroj kaj instruistoj. Post la someraj ferioj



5-a RR: Taewoo „laboras kiel okso ...“

tie en septembro komenciĝis Esperanto-laborgrupo, kiun partoprenis du instruistinoj kaj naŭ gelernantoj. Ankaŭ kurso por plenkreskulaj komencantoj kun kvar partoprenantoj komenciĝis en novembro. Bedaŭrinde en 2008 ni ne havis eksterlandajn gastojn. Al la 5-a „Rata Rendevuo“ ni invitis ĉi-jare en oktobro al Emmerthal. 23 Esperanto-amikoj el la grupoj en Hanovro, Bielefeld, Detmold, Herzberg kaj Subvisurgo venis kaj renkontiĝis en la muzeo por agrikultura tekniko kaj kamplaboro en Börry. Dieter Brockmann klarigis al ni la malnovajn maŝinojn kaj labormanierojn kaj spicis sian prelegon kun multaj amuzaj anekdotoj. Taewoo el Koreio provis moviĝi la oksan radon, sed Zsofia kaj Wolfgang preferis testi la saklevilon kaj Jeong-ok la vento-balailon. Ekstere la



5-a RR: Kiom pezas Wolfgang?



5-a RR: Ĉu nova ilo por la frizisto? Jeong-ok testas vento-balailon ...

traktoroj tuj estis elprovitaj de Koĉjo, Conny kaj Alke. Post tagmanĝo en itala restoracio en Kirchohsen ni veturis al Hämelschenburg, kie ni vizitis la ĉirkaŭaĵon kaj la kastelon, konstruita en la stilo de la vezerrenesanco. Finiĝis la tago per raporto de Koĉjo el Siberio pri la „Internaciaj Tagnoktoj“ sur Krimeo. Ankaŭ en 2008 kelkaj el nia grupo vizitis aliajn Esperanto-renkontiĝojn. Do, ni 2-foje estis ĉe la BARO en Bad Münder, kiun denove organizis Wolfgang kaj Ingrid kun Andi el Hanovro kaj kie Iris prezentis grandan fungo-ekspozicion kaj bongustan fungomanĝaĵon. Thomas vizitis ĝardenan feston en Bremen, la balailĵetadon en Nordenham kaj pliajn kunvenojn de la Esp.-grupo Subvisurgo. Thomas kaj Heinz veturis al Bremen, kie okazis la EMAS-kulturtago, interalie kun bela koncerto de Alejandro Cossavella el Argentino. Thomas ankaŭ veturis al renkontiĝoj en Herzberg. Ralitsa denove vojaĝis per Pasporta Servo al Londono, kie ŝi tranoktis kun sia patro ĉe maljuna Esperantistino. Heinz kaj Thomas vizitis la Germanan Esperanto-Kongreson en Essen, kie ili povis ĝui tre interesan programon,



5-a RR: Conny al Alke: Kien ni volas veturi ?



5-a RR: La partoprenantoj salutas

interalie ekumenan diservon kaj koncerton de „La kuracistoj“.
La plej granda evento vizitita certe estis la Universala Kongreso en Roterdamo, kien veturis Josefa, Thomas kaj Heinz. Okazis multaj interesaj prelegoj kaj belaj koncertoj. Josefa dancis dum la internacia vespero kaj Heinz kantis en la internacia koruso kaj aĉetis multajn novajn lernolibrojn. Dum niaj kunvenoj en la „Sumpfblume“ ni legis kelkajn interesajn tekstojn, ekz. „Pasko en Pollando“, „Simpligita anatomio“ de Raymond Schwartz, „Emilo en Smolando“ de Astrid



5-a RR: Malfacila laboro: Koĉjo startas motoron

Lindgren, „Kristnaska skeĉo“ de Loriot. Ni solvis krucenigmojn kaj aŭskultis kantojn de „Esperanto Desperado“, ekz. „Sola“, „En la mallumo“, „Feliĉe“. Ni kune rigardis la filmon „Blindsight“ de Sabriye Tenberken kaj aliaj pri blindaj tibetaj gejunuloj, kiuj suprengrimpis montegon en la Himalajo. Heinz raportis pri vojaĝo al Granda Kanario, Wolfgang kaj Ingrid pri Madejro kaj Ralitsa pri vojaĝoj al Varsovio, Berlino kaj Dresdeno. En la ĵurnalo aperis kelkaj artikoloj, ekz. pri niaj celoj en 2008 komence de la jaro, pri la jarĉefkunveno kaj la „Rata Rendevuo“. Ankaŭ radiointervjuo ĉe la loka Radio Aktiv okazis kun Heinz. Kulminoj de la regulaj renkontiĝoj certe estis la tre amuza somera ĝardena festo kaj la vere gaja kaj bonhumora antaŭkristnaska festo kun „rubaĵ-kobolda“ donacado en la restoracio „Pfannekuchen“.

**Esperanto-Treffen:**
www.eventoj.hu/kalendar.htm

**2009:** 11.-25.1. Sommerkurse, Sydney, AUS; 20.-22.2. 40. Studienwochenende, Herzberg; 22.-28.2. Woche der intern. Freundschaft, Herzberg; 26.2.-10.3.: 8. Himalaja-Treffen, Katmandu, Nepal; 27.2.-1.3. EDE-Konferenz, Strasbourg, FR; 6.-9.3. Kurse, Schoonloo, NL; 13.-14.3. Kurse, Herzberg; 16.-21.3. Kurse, Nilvange, FR; 3.-5.4. Sabla Printempo, Písek, CZ; 3.-6.4. Mezorienta Kunveno, İznik, TR; 8.-14.4. IJF Jugendfestival, Giulianova, IT; 9.-12.4. KEKSO, Kurse für Jugendliche, Creglingen; 9.-13.4.



5-a RR: Dieter Brockmann amuze klarigis ĉiujn malnovajn agrikulturajn ilojn